



Mia irlanda vojaĝo

Gertrude Novak, sekretariino, UEA Delegito

Je fino de Marto mi partoprenis unusemajnan grupvojaĝon tra Irlando. Ĝi konsistis el direkta flugo al Dublino, kiu troviĝas sur la orienta marbordo de Irlanda Respubliko, kaj posta rondvojaĝa busveturado tra Westport, Galway – ĝemelurbo de Ŝikago kaj laŭ la okcidenta marbordo. Dekomence ni pasis ebenan “Midlands”, kie estis vizitataj ellabora domego Strokestown, muzeo pri la irlanda malsatego, mirakla sanktejo Knock. Poste sekvis ekskursoj en belega abatejo Kylemore, universitata urbo Galway, al klifoj de Moher super la Atlantika oceano kaj kastelo Bunratty, kie ni vespere ĝuis la mezepokan bankedon. Sekvantage ni veturis tra la lagregiono Killarney, kie nin surprizigis altaj 13 000 futaj montoj kun neĝe kovritaj pintoj. Poste ni iris laŭ bordo de fjordo, duoninsulo, finfine ni atingis Blarney Kastelon, poste – distilejon de Jameson, kristalfabrikon de Waterford kaj reveno al Dublino.

Por iu ajn, kiu jam faris viziton al la Verda Insulo, tiuj lokoj probable estas konataj, sed mi devas ion komenti: la ĉefurbo Dublino havas ne nur riveron Liffey kaj multoblajn monumentojn al herooj de la irlanda batalo pro nedependeco, sed ankaŭ montras la antikvan mondfaman, belege ilustritan Libron de Kells (Trinity Kolegio). La imponaj domegoj atestas pri la malŝpara vivmaniero de riĉuloj dum la Brita superregado.

La Muzeo de malsatego ilustris ĉiujn fazojn de la katastrofa krizo de 1840aj jaroj. Kylemore estas prototipa feinhistoria kastelo, kiu estis ŝanĝita en abatejon kaj poste – en edukpansionon por la elitaj knabinoj de Irlando. Galway estas la ĉefurbo de la Okcidento. La vento-plenaj kaj altegaj (600 futaj) Klifoj de Moher estas kutima turisma allogaĵo. Kaj bankedo en Bunratty kastelo certe estis tipa “porturisma”, sed ankaŭ satinda kaj edukanta. Jes, mi kisis faman Blarney Ŝtonon, kiu estas propra parto de la tura ŝtonmuro. Viskia distilejo, kompreneble, reflektas la irlandan tradicion de alkohol-trinkado, same kiel mondfamaj manfabrikitaj kristalaĵoj de Waterford.

Tamen, mi ĉefe estis interesinta en plia lernado de historio

kaj de nunaj vivo kaj kondiĉoj de Irlando. La kasteloj – simplaj fortikaj turoj de l’antikvaj tempoj, kiam multopaj sendependaj klanestroj ofte batalis unu kontraŭ alia, kaj pli grandaj kasteloj protektis kaj defendis de eksterlandaj invadintoj, klare atestas pri la antaŭaj brutalaj tempoj. La Muzeo de Malsatego memorigas diversajn flankojn de tiu tragedio de Irlando, kiam terpomo estis la sola manĝaĵo, sed plantmalsano detruis ankaŭ ĝin, kaŭzante mortmalsaton de la plej granda parto de loĝantaro kaj devigan amaselmigrigon de la lando.



La plej grava signifo por nia tempo estas la impona altnivelo de irlanda ekonomiko., kiu per altaj salajroj (kaj prezoj!), modernigado, vasta domkonstruado kaj aliaj indikoj de prospero konkurencas kun aliaj landoj. La elstareco de gejunuloj kaj grandioza ekonomik-nivelo estas absolute diferenca al la longtempa tradicia kampara vivstilo, kiun mi atendis trovi kaj kio esence malaperis, escepte de la pejzaĝoj de ŝtonmure borditaj kampoj (verdaj kaj ŝafplenaj en oriento, sed malfekundaj kun malabunde dispersitaj lan-bestoj en okcidento). Tiu ĉi signifa transformado sekvis el la eniro de Irlando en Eŭropan Union (1973), malferminte eblecojn por komerco kaj vojaĝoj kaj por grandaj investoj de l’eksterlando. Ĉio ege puŝis la prosperon dum la lastaj 30 jaroj kaj nun oni nomis la landon “La kelta Tigro”!

En Dublino vagas homamasoj, multaj el ili estas lastatempaj enmigrintoj (plejparte – poloj), kiuj venis pro ebleco studi kaj labori. Do, la direkto de hom-fluo reversiĝis de la antaŭa dominanto de elmigro (pasis sufiĉe longa tempo, ĝis mi trovis irlandevenan laboranton en hotelo). Resumante, mi trovis Irlandon multe ŝanĝita de sia antaŭa malriĉa kampara stato al nuntempa “La kelta Tigro”. Ĝi ankoraŭ ofertas belajn naturaĵojn kaj vizitindaĵojn de sia historio, kvankam kreskanta ekonomiko multloke anstataŭigas pejzaĝon. Mi, tamen, trovis kelkajn antaŭimantajn irlandanojn pensante: “Ĉu povas daŭri tio ĉi?”

Ŝikago aŭ Ĉikago?

Mi pardonpetas, ke mi rompas la temon kaj ĉikanemas, sed mi ne povas ne esprimi mian, milde dirite, malaprobbon al la formo "Ŝikago" (pro tio dankon, Araneo). Mi vidas neniun motivaĵon forrezigni la PIVan formon – ĝi ja estas internacie pli multe konata, ol Ŝikago (mi neniel povis kompreni, pri kio temas, ĉu pri iu japana urbo, ĝis mi vidis la menciitan "Chikago"). Se temas pri adopto de iu tute nova toponimo, oni eble povus heziti, ĉu orientiĝi al la angla aŭ al la franca prononco. Sed ja temas pri tute stabila kaj vaste akceptita lingvo-elemento!

Aldone, se oni farus minimumajn observojn pri la Zamenhofaj (kaj ĝenerale lingvaj) kutimoj esperantigi diverslingvajn vortojn (ankaŭ toponimojn), oni facile konstata, ke por E-to multe pli gravas la grafismo de la koncerna toponimo, sed ne la fonetismo. La franca Chartres (pronontaca kun ŝ) estas multe pli nature (kaj pli ofte) esperantigata kiel Cxartro, ĉar tiu formo konservas la rekoneblan C komence de la vorto. Mi vere vidas neniun kialon uzi la formon "Ŝikago" anstataŭ Ĉikago. Plej bondezire, Paŝa, Krimeo, Ukrainio

Grave:

Inter miaj esperanto-lernantoj estas unu junulino – studentino de Fremdlingva Universitato, kiu estas katolikano. Ŝi eklernas Esperanton, kun celo pli bone agadi en la religia sfero. Konsiliĝante kun unu katolika pastro, tiu ĉi esprimas sian dubon pri la praktika valoro de nia lingvo. Ŝi sin demandas, ĉu ŝi daŭre lernu Esperanton. Mi jam sciigis al ŝi la retadreson de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) por plia informo. Mi petas katolikanoj-esperantistojn skribi al ŝi mallongan leteron en facila Esperanto por kuraĝigi ŝin. Dankon pro via helpo kaj kontribuo al la movado. La retadreso de la lernantino Thuy Hoang: thienthaibon87@gmail.com

Velura Sezono – XIII

22-a de junio - 1-a de julio. La aliĝado komenciĝis. Rigardu paĝaron www.jaltaespero.narod.ru kaj aliĝu. Fruaj aliĝintoj havas avantaĝojn. Krom 3 kutimaj koncertoj diverslingvaj por la vasta publiko okazos aparta koncerto nur en esperanto kaj aŭtoraj koncertoj nur por festivalanoj. En la koncertoj plimultiĝos dancaj eroj kaj aldoniĝos teatraĵoj. Ekskursoj al muzeoj – senpagaj. Diskotekon gvidos DJ Roger (Brazilo), la etoson kreos JoMo. Nun okazas intertraktoj pri partopreno de Martin Wiese (Svedio), iama gvidanto de legenda rok-grupo "Persone". La maro kiel kutime estos varma. Bonvenon!

Saluton! Mi skribas el Pollando kun espero, ke baldaŭ kun via helpo sukcesos min trovi gekorespondantojn en via lando: mi havas 40 jarojn, pri Esperanto mi okupigxas cxirkaux 20 jaroj. Agxo kaj sekso de gekorespondantoj ne gravas, mi volus cxefe ekkoni la homojn de via lando, amikigxi kun ili. Jen mia adreso: basiak67@op.pl

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNVENOJ

okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

22an de Majo **Karlo Offutt** prelegos pri E-komponisto Lou Harrison.
24an de Junio en la hejmo de **Roberto kaj Sepideh**, ni havos piknikon. Jen la adreso:
1315 Jeannette St., Des Plaines, IL 60018

Atenton: la programo povos esti ŝanĝata. La prelegontoj estas invitataj

